

Groupe Espérantiste Périgourdin (GEP)

Cours d'espéranto, conférences, expositions...

17 rue Pierre Clostermann 24330 BASSILLAC Tél. : 05 53 54 49 71

<http://esperanto-gep.asso.fr>

esperantoperigord@yahoo.fr

Présidents d'honneur : Jacques GREGOIRE et Jacques RAVARY.

Président : Ange MATEO, 24330 Bassillac

06 88 74 94 78 angemateo@yahoo.fr

Vice-président : Maurice JUY, Les Campagnolles, 24370 Calviac en Périgord.

05 53 59 60 27 monique.juy@wanadoo.fr

Vice-président : Claude LABETAA, 17, rue Pierre Clostermann, 24330 Bassillac.

05 53 54 49 71 labetaa.claude@wanadoo.fr

Secrétaire : Martine DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 martine.demouy@wanadoo.fr

Secrétaire adjointe : Michèle DELPEY, 31, rue Antoine Gadaud, 24000 Périgueux.

05 53 09 30 88 lmdepey@gmail.com

Trésorier : Max DEMOUY, 114 bis, rue des Remparts, 24000 Périgueux.

05 53 09 69 82 max.demouy@wanadoo.fr

Trésorière adjointe : Anne-Marie GALESNE, 96, rue Gambetta, 24000 Périgueux

05 53 53 94 13 anne-marie.galesne@orange.fr

Déléguée auprès des jeunes : Alexia AUGRAS, 121, boulevard du Petit Change, 24000

Périgueux 06 89 15 89 24 alexia.augras@orange.fr

Relais locaux (des espérantistes près de chez vous) :

Bergeracois : Luc BAHIN, Le Pouyolou, 24140 Beauregard et Bassac.

05 53 80 09 38 luc.bahin@free.fr

Mussidanais : Richard RIO, 25 rue Arzens, 24400 Mussidan.

05 53 82 69 71 r.rio@laposte.net

Périgueux et agglomération : Claude LABETAA (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Saint Cyprien : Odette JARDIN, lieu-dit Escavailles, 24220 SAINT CYPRIEN

05 53 29 32 75 odet.jardin@orange.fr

Sarladais : Maurice JUY (vice-président, coordonnées ci-dessus).

Informilo / Bulletin d'information

Rédaction collégiale. Mise en page Claude Labetaa. Envoyez vos documents, si possible en format numérique à labetaa.claude@wanadoo.fr, avant le :

1^{er} février pour le n° du printemps

1^{er} mai pour le n° de l'été

1^{er} août pour le n° de l'automne


1^{er} novembre pour le n° de l'hiver.

Cotisations 2015 (de sept 2014 à août 2015)

Sauf erreur de notre part, vous êtes dans la situation suivante : ☐ service gratuit

☐ adh 2015 ☐ sout 2015 ☐ adh 2016 ☐ sout 2016 ☐ veuillez régler :

Attention ! Nous proposons maintenant une adhésion commune Espéranto-France - Groupe Espérantiste Périgourdin ouvrant droit à déduction fiscale. Bulletin et précisions sur demande aux adresses ci-dessus ou auprès de nos animateurs.



ESPERANTO

Périgord

INFORMILO n-ro 102

Vintro 2015-2016

Le bulletin d'information du Groupe Espérantiste Périgourdin,
trimestriel en français et en espéranto.



Notre groupe a partagé la traditionnelle galette des rois vendredi 15 janvier. Quelques photos page 3.

- "Stranga Afero", par Ange Mateo page 4
- "Vous n'aurez pas ma haine" : le texte bouleversant d'Antoine Leiris, dont l'épouse est décédée le 13 novembre au Bataclan, a été traduit par Raita, une espérantiste finlandaise page 6
- Le vocabulaire de l'informatique, puis un scrabble en espéranto pages 8 et 9
- La angulo de la poeto: Gaston Waringhien page 10

kaj tiel plu...

Jean-Marie Pelt et Umberto Eco étaient favorables à l'espéranto

Jean-Marie Pelt, ce grand monsieur de l'écologie, décédé en décembre, avait signé, il y a quelques années en compagnie de son ami Denis Cheissoux, la pétition pour "l'Espéranto au Bac". C'est Michèle Delpy qui les en avait convaincus à Périgueux lors d'une de leurs conférences.

Umberto Eco, décédé en février, s'était plusieurs fois prononcé en faveur de l'espéranto, notamment dans son livre "La recherche de la langue parfaite."

Le jour de Zamenhof : de belles rencontres par Skype

Nos rendez-vous par Skype du 15 décembre, le jour de Zamenhof, ont été nombreux et fructueux. En tout, près d'une trentaine de Périgourdins se sont succédés soit au magasin Communic'action, à Périgueux, soit chez Maurice et Monique Juy, à Calviac-en-Périgord, pour communiquer avec leurs amis du monde entier, d'une vingtaine de pays différents.

Il est difficile d'être plus précis sur le nombre de pays participants car nous avons reçu l'aide d'un espérantiste japonais, Faro, pseudonyme de Tsukuru Harada, qui organise chaque jour une conférence par Skype et nous a mis directement en relation avec ses correspondants habituels.

Parmi les temps forts de cette journée, signalons la description du site internet Esperanta RetRadio (<http://esperantaretradio.blogspot.fr/>) par son créateur, l'autrichien Anton Oberndorfer. Ce dernier publie quotidiennement, y compris les jours fériés, un texte en espéranto accompagné d'un enregistrement sonore. Puis ce fut le tour du brésilien Paulo Sérgio Viana, un des contributeurs de ce même site.

Zsófia Kóródy nous parla de Herzberg am Arz, la ville allemande où elle anime beaucoup d'activités, qui s'est déclarée "ville-espéranto". Apélété Agbolo, du Togo, nous parla d'Izo, l'Institut Zamenhof, de Lomé, où 600 enfants apprennent, entre autres, l'espéranto ; cet institut est soutenu par l'association Une école au Togo. Nous avons fait la connaissance d'un groupe italien proche de Parme. Marie-France put retrouver Aura, sa correspondante colombienne...

La cantatrice hongroise Anjo Amika nous chanta malgré quelques problèmes techniques "Bela Revo", l'un de ses succès, tandis que l'auteur compositeur russe Michaël Bronstein, qui nous avait rendu visite il y a déjà trois ans, chanta lui aussi, en s'accompagnant à la guitare.

Ce fut une bien belle journée, grâce à tous les participants, que nous remercions chaleureusement !

Stage de chant en Limousin, les 12 et 13 mars

Nos amis d'Espéranto-Limousin organisent un stage de chant les 12 et 13 mars au Centre Nature "La Loutre", à Verneuil-sur-Vienne (ouest de Limoges). Le chant aura plutôt lieu le dimanche et des cours pour plusieurs niveaux seront également organisés samedi. Il est possible d'arriver dès vendredi soir.

Prix du stage : 40 €, comprenant l'hébergement chez des espérantistes des alentours. Renseignements : isabellejacob@laposte.net et 05 55 03 54 76.

Un espérantiste pakistanais en Dordogne du lundi 4 au mercredi 6 avril

Réservez les 4 et 5 avril pour Saeed, un espérantiste pakistanais qui nous rendra visite dans le cadre des tournées organisées par Espéranto-France. Des informations complémentaires seront diffusées par courriel.

Kvinpetalo (4 rue du Bureau, 86410 Bouresse)

Du 11 au 16 avril, stage de traduction animé par Brian Moon : traduction en espéranto de textes français les plus divers. Bien que le niveau visé soit élevé, le stage est ouvert à tous. Ce stage est également préparatoire à la spécialité traduction de "la Atesto pri Supera Lernado" de FEI.

A la suite du stage, le 17 avril, aura lieu l'Assemblée Générale de la SYM (Société Yvonne Martinot), l'association gestionnaire de Kvinpetalo.

Renseignements : <http://kvinpetalo.org>

Le château de Grésillon (St.Martin d'Arcé, 49150 Baugé)

Du 8 au 16 avril : PRINTEMPaS, cours intensifs avec Radojica Petrović (niveaux B1-B2), Christophe Chazarein (niveaux A2-B1), Marion Quenut (niveaux A1-A2). Ces cours préparent aux sessions d'examen KER ci-dessous.

16 avril : sessions d'examen KER (cadre européen de référence) pour les niveaux B1, B2 et C1.

20 au 24 avril : stage de chant choral (chorale Interkant') animé par Maja Mériaux (Bretagne) et Zdravka Bojčeva (Savoie).

Renseignements : <http://www.gresillon.org>

Le congrès universel de Nitra (Slovaquie) aura lieu du 23 au 30 juillet 2016

Plusieurs périgourdins sont déjà inscrits. Pour bénéficier d'un tarif avantageux, inscrivez-vous avant le 31 mars.

Renseignements : <http://www.nitra2016.sk>

LA ANGULO DE LA POETO

far Ange Mateo



Gaston WARINGHIEN (1901-1991) estis franca profesoro kaj grava vortaristo, gramatikisto kaj historiisto de Esperanto. Li verkis, tradukis kaj estis prezidanto de la Akademio de Esperanto de 1963 ĝis 1979. Vortaristo, li kondukis la skribadon de la *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV en 1970) kaj estas aŭtoro de la *Plena Analiza Gramatiko* (PAG), kun Kálmán Kalocsay.

Proverboj, aperis en « *Kaj la ceter' nur literaturo* », paĝoj 116-118.

Amikon havis ja Herkulo
kaj edzineton, kiu flirtis;
kaj la amiko sen skrupulo
kun lia edzinet' malvirtis.
Sed jen Herkulo ĝin rimarkis
kaj l' adultulon tuj pafarkis.
Ne ŝovu nazon en fremdan vazon.

Liajn kisojn brulpasiajn
ŝi ricevis kun plezuro,
kaj eĉ lipkaresojn tiajn
ŝi redonis sen uzuro,
sed postulis post la far'
tujan geedziĝon, ĉar
Se vi donas mielon, donu ankaŭ kuleron.

Frivole juna Anna jesis
al la trezoro arkiduka,
kiun por ŝia man' promesis
miliardulo tre kaduka.
Sed spertis ŝi post la edziĝo,
ke riĉo estas ne feliĉo.
Bone kreskas la herbo, sed ĉevalo jam mortis.

Ŝia eduk' estis nobela,
fadenon ŝi ne sciis tiri;
sed enamiĝis nia bela,
ŝi lernis kudri kaj kuiri,

vintro 2015-2016 – paĝo 10

kaj, forgesante la blazonon,
nun flikas eĉ lian kalsonon.
Pro amo al la kandelo kato lekas la
kandelingon.

Novedzo hasta kaj abrupta
al kuracisto multescia
plendis, ke al invit' volupta
l' edzino restas tutglacia.
La orakolo tuj verdiktis,
kion al homoj sperto diktis:
Selante ĉevalon, oni ĝin karesas.

Sultanino, neglektite,
ne rezignis la amkukon:
manke de pli bona, spite
amindumis ŝi eŭnukon.
Kvankam li fervore taskis,
la afer' tamen fiaskis.
Nenia peno nek provo donos lakton de bovo.

Al sia patro ĵus Alfreda
konfesis, kun plor-akompano,
ke estas ŝi iom graveda –
sed pri la patro de l' infano
nenion ŝi suspektas, ve!
Kaj tamen oni diras, ke
Scias la kato, kies lardon ĝi manĝis.

La galette du GEP

Près d'une trentaine de membres de notre association se sont succédés dans l'après-midi du vendredi 15 janvier pour partager la traditionnelle galette des rois.



Découverte de l'espéranto par internet

De jeunes suisses d'un collège de Fribourg ont choisi l'espéranto pour thème lors de trois journées thématiques, début février. Pour la cinquième année consécutivement, Claude a animé l'atelier depuis Bassillac à l'aide du logiciel Skype.



STRANGA AFERO far Ange Mateo

Polica amiko rakontis al mi tiujn faktojn, kiuj ege interesis min. Mi do decidis publikigi tiujn por informi pliajn homojn...

Fragmentoj de la taglibro de sinjoro Xxx Xxxxxx

Antaŭ kelkaj tagoj mi vagadis tra la piediraj stratoj meze de la homamaso, kiu, kiel mi, volis ĝui belan veteron. La antaŭaj tagoj estis grizaj kaj pluvaj kaj ne estis multaj homoj ekstere dum tiu malvarma aŭtuno. Ĉiu deziris do profiti la okazon por ricevi iom da lumo kaj varmo, cele al varmigo de la kompatindaj korpoj.

Stranga mezaĝa viro altiris mian atenton kaj vidadon. Meze de la strato, kun granda sako sur sia dorso, li fikse rigardis ion ekstere de konstruaĵo kaj poste li febre inspektis sian brakhorloĝon, kvazaŭ lia vivo dependis de lia ago. Lia kapo rapide kaj alterne moviĝis supren kaj malsupren, por kontroli ion, kio ŝajnis al mi tre mistera.

Mi senbrue alproksimiĝis al li, sed tio ne neces^{is}, ĉar lia sekreta laboro tute absorbis lian penson. La mondon povus detrui katastrofo, mi estis certa ke tiu evento tute ne distrus lin de lia tasko.

Subite la absorbata ulo genuiĝis faligante folieton, kiun mi ne antaŭe vidis, ĉar ĝi certe estis kaŝita en mano. Ploroj kaj ĝemoj aŭdiĝis en la strato, kaj nun ĉiuj surprizitaj homoj rigardis tiun viron lamentantan. Ĉar mi estis apud li, kaj lia konduto mirigis min, mi metis mian manon sur lian dekstran ŝultron kaj alparolis lin: "Kio okazas al vi, sinjoro? Ĉu io grava? Ĉu vi bone fartas?"

Li malfacile parolis inter la ĝemoj kaj la spasma spirado. Sed malgraŭ tio la afliktita viro sukcesis rakonti al mi historion tute nekredetlan. Li memdire ricevis leteron de iuj eksterteranoj, kiuj volis inviti lin al **sia** planedo por detale kaj longe studi homan estaĵon. Tiu eksterterana popolo elektis lin ĉar li estas sola, sen familio, kaj plie lia laboro kaj ankaŭ lia vivo ne plu interesis lin. Laŭ ili, li estis preta adiaŭi al sia planedo kaj ankaŭ malkovri alian lokon kaj vivon.

- Vi certe opinias, ke mi estas tute freneza... Mi nun ekpensas kiel vi. Hodiaŭ mi devis ricevi la konfirmon, ke tiu afero ne estas grandampleksa mistifiko.

- Jes... sed mi ne komprenas. Kion vi rigardis antaŭ kelkaj minutoj?

- Ha ve! La indikoj de la letero estas tre precizaj: mi devis esti antaŭ tiu konstruaĵo je la dek kvina kaj kvarono. Je tiu horo la sunlumo flanke lumigas la muron kaj tiel aperigas iujn desegnojn aŭ signojn.

- Kaj ĉu vi ne vidis tiujn simbolojn? mi fine demandis al li, por akiri pliajn informojn pri tiu enigma afero kaj kompreni lian malklaran prempenson.

- Ne! Tute ne! Mi ne vidis la desegnojn kaj krome, dum tiu preciza

Bajto (octet) konsistas el 8 bitoj kaj povas kodi $2^8 = 256$ malsamajn signojn (literojn, ciferojn, interpunkciajn signojn...).

1 kilobajto = 1024 bajtoj

1 megabajto = 1024 kilobajtoj

1 gigabajto = 1024 megabajtoj

1 terabajto = 1024 gigabajtoj

Ĉio ĉi ŝajnas malsimpla, tamen komputilo laboras multe pli rapide ol homoj... kiam ĝi bonvolas funkcii!

Venontfoje mi prezentos la vortojn bezonatajn en *Interreto (internet)* aŭ, se vi preferas, en *la reto (le réseau)*.

(1) Ni ne plu uzu la iamajn vortojn *komputero* kaj *komputoro*.

ESPERANTA SKRABLO

Maurice Juy, vice-président et animateur du GEP en Sarladais, a fabriqué lui-même un jeu de Scrabble en espéranto.

Toutes les lettres sont en buis et le support est une inclusion en résine époxy.

Le nombre de lettres et leur valeur (indiquées ci-dessous entre parenthèses) respectent les prescriptions du site <http://skrablo.ikso.net>.

Vous pourrez également sur ce site jouer en ligne ou consulter, en espéranto, les règles du jeu.

8 A (1) 2 G (3) 4 K (2) 6 S (1)

2 B (4) 2 Ĝ (3) 4 L (1) 1 Ŝ (4)

1 Ĉ (4) 1 H (8) 4 M (2) 4 T (1)

2 Ĉ (4) 1 Ĥ (10) 6 N (1) 4 U (1)

3 D (2) 8 I (1) 8 O (1) 1 Ŭ (8)

8 E (1) 3 J (2) 3 P (2) 2 V (3)

2 F (3) 1 Ĵ (10) 6 R (1) 1 Z (5)

2 ĵokeroj Entute 100 tegoletoj



INFORMADIKO KAJ KOMPUTILOJ

far Claude Labetaa

De kelkaj jardekoj komputiloj invadas nian mondon. Ĉar Zamenhof kompreneble ne konis ilin necesis kaj ankoraŭ necesas krei neologismojn. Antaŭ akordiĝi pri nova vorto la esperantistoj kelkfoje hezitas inter pluraj opcioj.

Komputi estas kalkuli uzante tiucelan ilon. *Komputilo* (1) estas la plej ĝenerela kaj nuntempe disvastigita ilo por tion fari. Plej ofte oni tradukas la vorton *komputilo* per *ordinateur* sed laŭ la kunteksto *komputilo* povas signifi pli simplan objekton kiel *calculette* aŭ eĉ *boulier*. La tiutema scienco nomiĝas *informadiko* aŭ *komputiko* (*informatique*).

El kio konsistas komputilo? La *centra aparato* (*unité centrale*) enhavas interalie la ĉefkarton aŭ ĉeftabulon (*carte-mère*), sur kiu troviĝas la ĉefa ero de la komputilo, tiu kiu kalkulas: la *procesoro* (*processeur*). Ekstere estas la *ekrano* (*écran*), la *klavaro* (*clavier*), sur kiu kuŝas la diversaj *klavoj* (*touches*), kaj la *muso* (*souris*). En porteblaj komputiloj tiuj eroj, kelkfoje krom la lasta, estas kunigitaj.

Al la centra aparato povas esti konektitaj *presilo* aŭ *printilo* (*imprimante*), *skanilo* (*scanner*) por *ciferigi* (*numériser*) dokumentojn, *laŭtparoliloj* (*hauts-parleurs*)...

La konkreta aparataro ("*hardware*" = *les outils concrets*) bezonas programojn (*programmes*) por funkcii. La programaro ("*software*" = *les outils intellectuels*) estas la tuto de ĉi tiuj programoj. Kiam oni aĉetas komputilon, ĝi funkcias danke al operaciumo (*système d'exploitation*). Ekzemple: *Vindozo* (*Windows*) estas kosta, *Linukso* (*Linux*) estas senpaga kaj libera.

La operaciumo ebligas vin aliri al la programoj, kiujn vi kutime uzas por plenumi diversajn taskojn. Vi uzas *tekstotraktilon* (*traitement de texte*) por krei tekston, *tabelkalkulilon* (*tableur*) por krei *kalkultabelon* (*feuille de calcul*), *prezentilon* (*logiciel de présentation*) por prelegi montrante *lumbildojn* (*diapositives*). Aliaj apartaj programoj ebligas vin krei kaj modifi *datumbazojn* (*bases de données*), *bildojn*, *sonojn*, *videojn*...

Ĉiaj komputikaj dokumentoj aperas sub la formo de *dosieroj* (*fichiers*), registritaj en *dosierujoj* (*dossiers*), kiuj estas eroj de la arbo (*arborescence*) de *fiksita disko* (*disque dur*). Sciu, ke la *dosieroj* konsistas nur el *bitoj* (*bits*), kiuj estas *binaraj*, aŭ *duumaj*, *ciferoj* (*chiffres binaires*): 0 aŭ 1.

"Bit" estas mallongigo de la angla esprimo "Binary digit" = duuma cifero. Por konkretigi duumajn ciferojn imagu, ke 0 rilatas al neluma lampo, kiam 1 rilatas al luma lampo.

tempo kaj antaŭ tiu domago, mi devis abrupte malaperi kaj troviĝi en flugmaŝino: tio estas klare skribita sur la letero...

Ĝuste tiumomente mi diris al mi, ke la cerbo de mia kunparolanto certe estis tute disturbata, do, ĉu mi devis alvoki kuraciston? Antaŭ ol mi decidis kion fari, li subite ekkuris kaj ĉifoje vere malaperis en la etajn stratojn, forlasinte min senreaga kaj tute mirkonsternita. Mi ne plu sciis, kion fari, kiam miaj rigardoj kaptis la folieton, kiun la kurioza ulo faligis sur la straton. Ĝin mi manprenis. La adreso de tiu ĉi loko estis mane skribita kaj ankaŭ la horo aludita de la frenezulo. Poste estis tri literoj, kiujn mi malfacile legis: "UT?".

Kion signifis tio? Ĉu tiuj literoj estis iu subskribo? Ĉu tiuj estis sur la letero de la eksterteranoj (sed ĉu ĝi vere ekzistis?) aŭ ĉu la stranga viro aldonis ilin? Sed certe tio ne havis ian sencon, ĉar li sendube skribis tion dum siaj deliroj... Mi decidis iri trinki varman ĉokoladon en apudan kafejon el tiu strato por komforte daŭrigi miajn pensojn pri tiu stranga afero.

La kelnero, kiun mi konis, afable bonvenigis min. Eĉ ĝuante mian bonan trinkaĵon, mi ne sukcesis solvi la enigmon pri tiuj tri signoj.

- Ĉu vi estas preta observi la luneklipson ĉi tiun nokton? diris ridetante al mi la agrabla kelnero. Li sciis, ke mi estas fervora amato de astronomio, ĉar ni jam interparolis pri tiu temo, kaj li pravis, mi jam preparis la noktan observon de...

Tio subite frapis min kiel fulmo! *UT: Universala Tempo*. Estas la tempo, la horo de la suno. Kaj aŭtune en mia lando estas necese aldoni unu horon por atingi la oficialan horon. La horo de la hipotezita korpa delokigo estis certe la dek kvara kaj dek kvin! La originala ulo ne devis scii tiun astronomian informon. Li do tro frue alvenis al sia preciza rendevuo.

Sed kion mi diris? Mi estis tute deliranta... Ĉu mi vere ekkredis tiun strangan aferon? Mi ne plu sciis... Tamen interesan kaj allogan penson konstruis mia menso: ankaŭ mi volus vojaĝi al alia planedo kaj malkovri fremdulojn, kiuj vivas en nia bela kaj vastega universo! Iam mi eble ricevos nekutiman leteron...

[post kelkaj paĝoj] Hodiaŭ stranga letero fine estis en mia leterkesto! Mi preferas nun diri nenion, ĉar eble estas grava afero, sed mi promesas baldaŭ skribi ĉion. Mi unue devas... [kelkaj frazoj estas elviŝitaj] Sed mi ne diras plu. [tiuj estas la lastaj vortoj, la ceteraj paĝoj estas tute malplenaj kaj virgaj]

Polica raporto

Najbaroj de sinjoro Xxx Xxxxxx alvokis nin, ĉar ekde kelkaj tagoj, ili ne vidis lin plu. Neniu malordo estas en la domo de tiu sinjoro. Aliaj faktoj: multaj sciencfikciaj kaj astronomiaj libroj sur la bretoj, malfermita taglibro sur skribotablo, sako kaj vestoj ŝajnas manki. Ni forprenas la taglibron por atenta esplorado kaj tiuj informos la polican malaperoservon pri tiu afero.

VOUS N'AUREZ PAS MA HAINE

Antoine Leiris

Ce texte magnifique et bouleversant a été écrit le 16 novembre 2015. Antoine Leiris, journaliste à France Bleu, venait de perdre son épouse Hélène, fauchée comme tant d'autres le 13 novembre au Bataclan.

Raita Pyhälä, espérantiste finlandaise qui correspond depuis longtemps avec Jacques Ravary, a voulu rendre hommage aux victimes et traduire ce texte pour un de ses amis japonais.

Ce message admirable peut ainsi faire le tour du monde.

Vendredi soir vous avez volé la vie d'un être d'exception, l'amour de ma vie, la mère de mon fils mais vous n'aurez pas ma haine. Je ne sais pas qui vous êtes et je ne veux pas le savoir, vous êtes des âmes mortes. Si ce Dieu pour lequel vous tuez aveuglément nous a fait à son image, chaque balle dans le corps de ma femme aura été une blessure dans son cœur.

Alors non je ne vous ferai pas ce cadeau de vous haïr. Vous l'avez bien cherché pourtant mais répondre à la haine par la colère ce serait céder à la même ignorance qui a fait de vous ce que vous êtes. Vous voulez que j'aie peur, que je regarde mes concitoyens avec un œil méfiant, que je sacrifie ma liberté pour la sécurité. Perdu. Même joueur joue encore.

Je l'ai vue ce matin. Enfin, après des nuits et des jours d'attente. Elle était aussi belle que lorsqu'elle est partie ce vendredi soir, aussi belle que lorsque j'en suis tombé éperdument amoureux il y a plus de 12 ans. Bien sûr que je suis dévasté par le chagrin, je vous concède cette petite victoire, mais elle sera de courte durée. Je sais qu'elle nous accompagnera chaque jour et que nous nous retrouverons dans ce paradis des âmes libres auquel vous n'aurez jamais accès.

Nous sommes deux, mon fils et moi, mais nous sommes plus forts que toutes les armées du monde. Je n'ai d'ailleurs pas plus de temps à vous consacrer, je dois rejoindre Melvil qui se réveille de sa sieste. Il a 17 mois à peine, il va manger son goûter comme tous les jours, puis nous allons jouer comme tous les jours et toute sa vie ce petit garçon vous fera l'affront d'être heureux et libre.

Car non, vous n'aurez pas sa haine non plus.

VI NE IGOS MIN MALAMI VIN

Antoine Leiris ; esperantigis Raita Pyhälä

Ĉi tiun belegan kaj kortuŝegan tekston skribis la 16an de novembro 2015 Antoine Leiris, ĵurnalisto el France Bleu, ĵus perdinte sian edzinon Hélène, mortigitan kiel tiom da aliaj la 13an de novembro en "Bataclan".

Raita Pyhälä, finna esperantistino kiu delonge korespondas kun Jacques Ravary, deziris omaĝi al la viktimoj kaj traduki ĉi tiun tekston por unu el siaj japanaj amikoj.

Ĉi tiu admirinda mesaĝo tiel povas disvastiĝi tra la tuta mondo.

Vendrede vespere vi ŝtelis la vivon de escepta estaĵo, la amo de mia vivo, la patrino de mia filo, sed vi ne igos min malami vin. Mi ne scias, kiu vi estas, kaj mi ne volas tion scii, vi estas senvivaj animoj. Se tiu Dio, por kiu vi mortigas tiel blinde, faris nin laŭ sia bildo, ĉiu kuglo en la korpo de mia edzino estiĝis vundo en Lia koro.

Do, mi ne premios vin per mia malamo. Tion vi ja celis, sed reagi al malamo per kolero estas cedi al la sama malklereco, kiu vin igis tia, kia vi estas. Vi volas, ke mi timu, ke mi rigardu miajn samurbanojn per okulo malfidema, ke mi oferu mian liberecon favore al sekureco. Maltrafe. Ludinto reludu.

Mi vidis ŝin ĉi-matene. Finfine, post atendoplenaj noktoj kaj tagoj. Ŝi egale belis kiel kiam ŝi elhejmiĝis en tiu ĉi vendreda vespero, egale bela ŝi estis, kiam mi freneze enamiĝis al si antaŭ pli ol 12 jaroj. Certe min ronĝas, ĝisoste mordas la doloro, mi koncedas al vi ĉi tiun venketon, sed ĝi ne longe daŭros. Mi scias, ke ŝi akompanos nin en ĉiu tago kaj ke ni retrovos unu la alian en la paradizo de liberaj animoj, kiun vi neniam eniros.

Ni estas nur du, mia filo kaj mi, sed ni estas pli fortaj ol ĉiuj armeoj de la mondo. Cetere, mi ne plu havas tempon por vi, mi devas iri al Melvil, vekiga el sia siesto. Apenaŭ 17 monatojn li aĝas. Kiel ĉiutage, li havos sian manĝeton, poste ni kune ludos kiel ĉiutage, kaj dum sia tuta vivo ĉi tiu knabeto estos feliĉa kaj libera, kaj tio malgraŭ vi.

Ĉar, ankaŭ lian malamon vi malhavas.